INTERLANGUAGE

# AMERICAN ESPERANTO MAGAZINE

"PEOPLES SPEAKING TO PEOPLES"

A WORLD INTERLANGUAGE NEEDED

ESPERANTO SOLVES THE PROBLEM


## AMERIKA ESPERANTISTO

*Oficiala Organo de la*

*ESPERANTO-ASOCIO de NORD-AMERIKO*

**JAN—FEB, 1951**

Twenty-five Cents

# AMERIKA ESPERANTISTO

Vol. 65 JANUARY-FEBRUARY, 1951 Nos. 1-2

## *NEW IDEAS ARE NOW IN ACTION*
## *ESPERANTO COMMUNITY LEADERS*
## *MORE MEMBERS! MORE MEMBERS!*

EVERY week brings us new ideas and suggestions. Each letter has been personally acknowledged, but thanks again anyway. And thanks, too, to those of you who have a cracking good idea, but have not got around to telling us about it. Trouble is, if you do not tell us, we do not know.

Some new ideas are now in action! A big mailing has gone out this month organizing *Esperanto Community Leaders.* With materials now available, a group can learn Esperanto with a good leader who may be just a beginner, too. Now it is possible for *Esperanto Community Leaders* to promote Esperanto locally and earn a modest remuneration while doing so.

If you want to know what's going on in the American Esperanto movement today, keep up-to-date with the new *American Esperanto Magazine* produced with our new equipment, and write us for:

1. *Esperanto Community Leadership Plan*

2. Leaflet: *Connor Correspondence Course in Esperanto*

3. Leaflet: *Tune in on the World*

More members! More members! December was the best December in three years for membership income. Keep it up! We must double our membership. And we can do it if everybody helps.

And we can help you with *envelope stuffers, Personal Growth Leaflet 183, membership cards,* and a beautiful new brochure *Tune in on the World.* Never before have we been supplied with such an abundance of attractive, convincing literature. Have you an efficient supply on hand?

*PUBLIC RELATIONS COMMITTEE*

Harold S. Sloan.

*Chairman*

# ESPERANTO IN ACTION AROUND THE WORLD

***"Kon-Tiki"***, Thor Heyerdahl's exciting bestseller describing the adventurous raft voyage of a band of modern Vikings from Peru to the Polynesian islands is now available in a beautiful Esperanto edition, with 60 pictures. The volume may be ordered from the book service of EANA (clothbound $3.90).

***In Iceland*** a public opinion poll showed 72.5% of the people favoring Esperanto and 17.1% opposed. 10.4% did not care to express an opinion.

***Love across the ocean, via Esperanto,*** has frequently led to international marriages. The latest addition is the wedding of *Ruilaf van Putten,* of the Netherlands, and *Nelly de Sousa Neto,* of Brazil who were married at Rio de Janeiro last June. They do not know each other's mother tongue and fell in love by correspondence, using only Esperanto. As a consequence of a radio interview after the wedding, more than 400 fan letters were received, all requesting information about how to learn Esperanto and how to find 'promising' pen pals abroad.

***The New International Year Book,*** published by the Funk & Wagnalls Company in New York, features a 1200-word article on Esperanto in its 1951 Edition. The article was written by *Dr. W. Solzbacher,* President of EANA, at the Editor's request.

***The Brazilian Ministry of Education*** has officially notified all high school principals of a prize contest for students, sponsored by the Brazilian Esperanto League. This year's subject is "The History of Esperanto", and there are six prizes. All essays must be in Esperanto.

***Every Sunday and Friday*** at 17:00 o'clock, the shortwave radio of the Italian Government broadcasts 20-minute programs in Esperanto over the wavelengths 19.5m. and 31.1m.

***The Swedish Red Cross Ambulance in Korea*** has a member who found Esperanto very useful when passing through Japan. He is *Frank Johansson,* of the Cooperative Esperanto Club, Stockholm.

# ESPERANTO - KRONIKO

***En Mount Vernon, N.Y.,*** proksimume 69 sinjorinoj de la religia asocio "Ladies of St. Ursula" aŭskultis kun granda intereso paroladon de *D-ro W. Solzbacher,* la 6an de Novembro.

***La bonega artikolo de Pastro LaFarge*** en "America" (vidu AE, Aŭgusto-Decembro 1950) kaŭzis priparolon de Esperanto en diversaj katolikaj lernejoj, Ekzemple, en St. Barnabas High School, Bronx, *Fratino Fidel* diskutis la artikolon en klasoj pri socia scienco.

***H. Herbert Howe,*** kiu kunlaboras en la Usona Esplorkomitato pri Marbordo- kaj Termezurado, regule aldonas Esperanto-resumojn al siaj anglalingvaj artikoloj. Du artikoloj tiaj jam aperis en la *Journal of Geophysical Research* (Ĵurnalo de Geofizika Esplorado), Junio 1950 kaj Septembro 1950.

***Unua Zamenhof-Monumento en Ameriko*** troviĝas en Belo Horizonte, Brazilo. Dimanĉe, la 17an de Decembro, 1950, oni solene inaŭguris la monumenton. Ĝi estas busto el bronzo, sur alta piedestalo el blanka marmoro, kaj staras sur bedo en formo de kvinpinta verda stelo en la ĝardeno de Placo Esperanto.

***15,000 dolarojn por instrui Esperanton*** ricevis religia kolegio en Elizabethtown, Pennsylvania. Testamento de *Emma C. Lander* donas tiun sumon kun la kondiĉo, ke la rento — aŭ rento aŭ kapitalo — estu uzata por ebligi kursojn de Esperanto en la kolegio. D-ro *Frederick C. Neumann,* membro de la lingva fako, komencos instrui la kurson, laŭ nunaj planoj, aŭtune 1951.

***Regulaj Radio-Programoj pri Esperanto*** estas projekto de la Klubo MOSAMO en Rolla, Mo. *Prof. John M. Brewer,* konsilanto de la klubo, raportas plenan sukceson. La grupo unue metas la programon sur magnetan rubandon; tiel oni povas facile ŝanĝi, ekzerci, eltranĉi ion, kaj la fina rezulto estas donata al la loka radio-stacio por dissendo. Al ĉiu aŭskultanto, kiu petas tion, estas sendataj mimeografitaj Esperanto-lecionoj.

***Novajn Esperanto-kursojn*** en du elementaj lernejoj organizis lastatempe *S-ino Helen A. Kraus, Baldwin, N.Y.,* kaj *S-ro Robert Alberg,* Lynn, Mass. La gejunuloj jam komencis korespondadon.

***Se vi renovigas abonon*** de iu eksterlanda gazeto, aŭ se vi deziras aboni iun novan — faru tion pere de EANA. Tio konservos al vi monon, tempon kaj laboron, kaj al EANA donos profiton.

***Foto-Glumarkoj,*** de vi mem kaj de viaj karuloj, estas farataj de *Joseph Leahy, 1754 Lanier Place, N.W., Washington, D.C.* Sendu peton al li por priskriboj kaj ekzemploj.

## *IMITINDA NOVA KURSO – ĈIU KURSANO EANA MEMBRO*




*S-ro Kail ĉe la tabulo.*

Maldekstre troviĝas bildo de energia gvidanto de nova Esperanto-kurso en Spencer, Iowa. Li estas *Konrad Kail,* kiu nun instruas Esperanton en la Vespera Lernejo de tiu mezusona urbo. S-ro Kail organizis la kurson en Novembro, kune kun sia amiko, *S-ro C.W. Baldwin,* advokato en Spencer. Dek-du personoj regule studas la interlingvon, kaj oni esperas komenci lokan Esperanto-grupon post fino de la lerneja kurso. Ni deziras al la nova grupo ĉiun sukceson.

Rezulte de tiu bone organizita laboro de S-ro Kail, ĝis nun aliĝis al EANA dek-unu novaj membroj. Ankaŭ al samideano *C.L. Krantz* en Madrid, Iowa, ni ŝuldas laŭdon, ĉar estis en lia hejmo, kie S-ro Kail unue trovis foliojn pri EANA, ekzemple, PGL 183, aliĝilojn, ktp. Tiu modela agado de du samideanoj estu instigo al aliaj!

### *Sukcesoj en la Kampanjo "Ĉiu Membro Varbu Unu Membron!"*

La sekvantaj aktivaj membroj tuj atentis nian alvokon pri varbado de almenaŭ unu nova membro por EANA. Cifero post la nomo signifas kiom da novaj membroj ĉiu alportis al nia Asocio:

*George W.Bailey, Jr.* (**3**), *A.I. Rogus* (3), *S-ino Flora Wyman* (2), *Donald Broadribb* (2); *H.G. Borden, S-ino I.C. Brady, H.B. Catlin, John Cornell, J.W. Dubin, G. Gabor, P.G. Heinle, D.A. Johnson, S-ino H. Kimball, C.L. Krantz, R.A. Rausch, G. Saunders, ĉiuj po 1.* Gratulon kaj dankon al vi!

***Pastro J.B. Se-Tsien Kao, O.F.M.,*** eminenta ĉina pastro, verkisto kaj Esperantisto-pioniro, pasis tra Usono en Novembro, irante de Hongkong al Sud-Ameriko. Pastro Kao multe helpis la Esperanto-movadon en Norda, Centra kaj Suda Ameriko kiel ankaŭ en Eŭropo kaj la Oriento.

Reirinte el Usono al Ĉinujo post la liberigo de la lando de la japanoj, Pastro Kao estis Ĝenerala Vikario de la katolika eparkio *Fengsiang,* poste ĉefredaktoro de ĉiutaga ĵurnalo en *Sianfu,* kaj fine Direktoro de la Eduka Fako de la Ĉina Katolika Centra Oficejo. Li foriris de Shanghai tuj antaŭ la alveno de la komunista armeo kaj pasigis longan tempon en Hongkong. Poste li ricevis la taskon prizorgi la religiajn bezonojn de la ĉinoj en *Lima,* ĉefurbo de Peruo.

## "GIVE 10¢ A DAY – TO E.A.N.A."

ALMOST four years ago my predecessor, the late *Professor Edwin L. Clarke,* launched the slogan: *"Ten cents a day–to E.A.N.A."* Emphasizing the need for strengthening our Association and its Central Office, he stated: *"Few of us are rich. We cannot count on good angels to finance us. The work must be done by the majority of us, persons in moderate circumstances, but persons who know that the wolf is a long way from their door. We ourselves must be the ones to put Esperanto on its feet financially."*

Pointing out that the number of those who can contribute every month 10 dollars or more to the Sustaining Fund is necessarily limited, he insisted that there are many members who could spare 10 cents a day, 3 dollars a month, or 36 dollars a year.

The response to President Clarke's appeal was encouraging, and some of those who heeded it have loyally supported the Sustaining Fund ever since. They deserve the everlasting gratitude of our membership.

*Now is the time to launch the old slogan again, and to do so with even greater emphasis and urgency.* There are much greater opportunities now for putting Esperanto on the map than there were four years ago, and our Association is in many ways better equipped to meet the challenge of the hour. At this very moment, however, we are faced with steadily rising costs, with greater difficulties in getting our printing done, and with new shortages caused by the critical international situation.

I am convinced that we can rise to the occasion and overcome temporary difficulties. But we need *your* help. We need more members willing to give *"Ten cents a day–to E.A.N.A."* Wouldn't you, dear member, take time out to examine your conscience, your budget and your heart – and then answer "present" to this call?

WILLIAM SOLZBACHER, *President, EANA*

---

This issue of *American Esperanto Magazine* is the first example of the new magazine, which will be published monthly (except one issue for July-August) during the coming year. The new techniques employed make it possible to continue a high level of printing, and at the same time, use interesting illustrations and designs. We hope to show more and more improvement as we gain experience in the new methods. We hope that you will also like the new *AE.* Let us know your impressions and suggestions.

G.ALAN CONNOR, *General Secretary, EANA*


# KANADA INFORMO

***Bob Mueller*** de Windsor, Ont., entuziasme studas Esperanton, kaj distribuas diversajn foliojn al studentoj de la Kolegio "Assumption". Li skribis: "Vere, miaj privataj studoj de la lingvoj greka, latina, franca, germana, hispana, itala, aldone al miaj regulaj studoj de greka literaturo, brita kaj usona poezio, kaj filozofio, iomete okupas mian tempon. Sed, venontfoje, kiam profesoro postulos tezon de mi, li ricevos ĝin Esperante skribitan."

***La Esperanto-Grupo de Vancouver*** aliĝis al EANA kiel subtenanta membro por la jaro 1951. Ni kore dankas la grupon pro tio.

***Samideano G. Clayton,*** post longa kaj streĉa malsano en malsanulejo, denove loĝas en Galt, Ont. Ni deziras al li plenan resaniĝon.

***Nova membro kaj patrono de EANA*** estas *F-ino Mary Rose Cameron* de la sanigejo en Hamilton, Ont. Ŝi komencis lerni Esperanton en Decembro.



LETTER FROM SACRAMENTO . . .


Dear Mr. Connor:
Our Esperanto class is continuing in good fashion. We feel that the "American Esperanto Magazine" is of such value to Esperantists that we would do well to subscribe to six (6) copies for the use of the class.
Can you enter the subscription in my name, or rather in that of the Evening Junior College, and have the package of 6 come to me at this address.
Cordially yours,
J.E. Carpenter
J.E. Carpenter, Principal
Sacramento Evening College

*Our appreciation to Mr. Carpenter. His letter points the way to increased interest for the class and increased support for EANA. An example other classes might well follow.*

# Pensu kaj Ridu

***Ekzistas en Usono*** vere giganta homo kun la Esperanta nomo "*Elektro*". Li estas 260 funtojn peza kaj 7 futojn alta. Ne el viva karno estas farita ĉi tiu homo, sed el aluminio.

*Elektro* estas mekanika homo, posedaĵo de la elektra kompanio Westinghouse. Tamen, sufiĉe talenta li estas. Li eĉ povas fari paroladon. Kompreneble, lia vortaro estas limigita — eĉ pli ol Baza Angla. Li povas uzi nur 77 vortojn. Lia cerbo konsistas el 82 elektraj vojoj kaj signal-lumoj, kiuj funkciigas lian nervsistemon de motoroj kaj ĉenoj, kaj ebligas al li marŝi, fumi, distingi inter koloroj kaj saluti sian kunulon.




Pro lia Esperanta nomo mi estas certa, ke *Elektro* ankaŭ komprenas Esperanton — ĉar jen la maniero laŭ kio oni ordonas lin: Du-vorta ordono komencas unu agon. Unu vorto haltas ĝin. Kvar vortoj returnas ĉion al neŭtrala pozicio. Do, ne gravas kiun vorton oni uzas, nur la nombro da lumimpulsoj gravas.

Kaj certe ankaŭ, *Elektro* povas paroli Esperante. Kial ne? La sekreto de lia parolkapablo estas mekanismo simile al aparato en radio-stacio, kiu disaŭdigas tion, kio estas sur disko aŭ fadeno. Tamen, spite la fakton, ke la mekanika homo pli kaj pli lertiĝas en simplaj agoj, mi multe dubas ĉu *Elektro* iam fariĝos bona studanto, aŭ tutlernos Esperanton. Fakte, multfoje, mi dubas, ĉu iam mi mem sukcesos fari tion! — *DTC*

***Laŭ ordono de Moskvo,*** *ni aŭdis*, ke hungaraj sciencistoj komencis esplorojn pri hibridoj, t.e. krucigo de du specoj por ricevi pli bonan specon. Oni jam raportis sukcesojn. Ekzemple: Post krucigo de akvomelono kaj pulo, oni ricevis novan specon de akvomelono, el kiu dum distranĉo la semoj mem elsaltas. Ankaŭ, post krucigo de bovino kaj ĝirafo, tio donis novan specon de bovino, kiu paŝtas sin en Hungarujo kaj oni melkas ĝin en Moskvo.

***Unu virino telegrafis*** el Florido al sia edzo en Chicago: "*Mi sunbruliĝas, sendu tuj kvindek dolarojn!*" La edzo sendis monon kaj post du tagoj ricevis denove telegramon: "*Mi sunbruliĝas, sendu ankoraŭ cent dolarojn!*" Tiam la edzo retelegrafis: "*Mi sendas ducent. Bruliĝu tute!*"

***Iu drinkemulo*** pasas ŝanceliĝante kaj ekpuŝas malmilde iun viron, kiu troviĝas antaŭ li. "*Nu,*" ekkrias tiu ĉi malbonhumore, "*Ĉu vi do ne vidas?*" "*Jes, ja,*" grumblas la drinkemulo. "*Diable, mi eĉ vidas duoble! Kaj, jen...*" "*Jen, kio?*" demandas la viro. Respondas la drinkemulo, "*Mi deziras pasi inter vi kaj la alia!*"

## DEZIRAS KORESPONDI

*Kosto de anonco: Eksterlande, unu vorto aŭ mallongigo por unu cendo (ses vortoj por 1 int. respondkupono); Enlande, unu vorto por du cendoj.*

*Brazilo.* S-ro Jose Marcilio, Avenida Perri, 217, ***Juiz de Fora,*** (Minas). Esperanta Komerca Servo, cr.$6,00 aŭ 4 respondkuponoj. La aliĝinto ricevas 50% de profito.

*Ĉekoslovakio.* Prof. Petro Zevl, ***Kralovice u Plzne.*** Kiu deziras amikan aŭ komercan korespondadon, aŭ interŝanĝon de PM,PK, libroj, gazetoj kaj aliaj kolektkuriozaĵoj el la tuta mondo, aliĝu al ABC-Internacia Koresponda Klubo. Skribu por prospekto.

*Francujo.* S-ro Roger Brunel, 60 Route Mihewaige, ***Carcassonne,*** (Aude). 20-j. dez. kor. pri ĉiuj temoj.

*Irlando.* Lorcán ÓhUiginn, Bóthar Glasárd 16, ***Dublin.*** Se vi interesiĝas pri "Tutmonda Katolika Adresaro", sendu 2 respondkuponojn al la supra adreso.

*Japanujo.* Esperanto-Koresponda Grupo, 260 Oka-Shinmachi, Hirakata, ***Osaka.*** 200 gegrupanoj dez. kor. kaj interŝ. PK, PM, il. gazetojn. Skribu multnombre. Ĉiu ricevas respondon.

*Svislando.* Oskar Wegmann, Obertor 26, ***Winterthur.*** Multaj svislandanoj deziras korespondi kun usonanoj.

*Usono.* S-ino Edith Kane, Box 36, ***Woodside,*** L.I., N.Y. Dez. kor. pri ĉiuj landoj kaj ĉiuj popoloj. Interesiĝas pri muziko kaj poezio.

---

### *THREE CHOICE ITEMS FOR YOUR ESPERANTO LIBRARY*

Every Esperantist should have these three rare examples of the best in Esperanto. Note that we have lowered our prices, *and we pay the postage.* If you order all three items, we will send them for $10.

**Rare Collection of 25 Keys,** rare and complete (25 languages with Esperanto): *Albana, Angla-Esp, Esp-Angla, Araba, Baska, Ĉeĥa, Dana, Estona, Finna, Flandra, Franca, Germana, Hispana, Hungara, Islanda, Itala, Japana, Norvega, Persa, Portugala, Romanĉa, Rusa, Slovaka, Sudafrika, Sveda.* The complete collection for $2.75

**Ĉeĥoslovaka Antologio,** edited by Ginz & Kamaryt. The best literature and art of free, pre-war Czechoslovakia. 468 pp illustrated, prefaces on dialects, art, Masaryk. Index. Paper edition $4.00

**Svisa Antologio,** edited by Arthur Baur. The best of Swiss literature from all four groups (German, French, Italian, Romansh, with prefaces). An imposing work of 540 pp. Paper edition $4.00

# NEW CONNOR COURSE IN ESPERANTO

## Correspondence Course with Vinylite Records
## Instruction by Doris Tappan Connor

New! Modern! The *"Connor Course"* is unique, — it provides real-life disk conversations plus the personal instruction of *Doris Tappan Connor.* The one and only record course, in any language, that gives *everything* in the way of learning aids. *NOW,* you can learn Esperanto like a "native" — *better, quicker,* and *easier.* And it's fun to learn this real-life way! You *converse* with the disk and *confer* with the instructor. The *"Connor Course"* is compiled by experts. *"Vinylite"* recordings by Mr. and Mrs. Connor. *All* designed so you can *master* Esperanto.

Connor Course

The complete *"Connor Course"* includes the following:
(1) A lively text, *"Esperanto: The World Interlanguage."*
(2) Eight complete *"Vinylite"* double-sided 10" records.
(3) A practical and easy-to-follow *'Study Guide'* (82 pp.)
(4) Personalized instruction and guidance of *Mrs. Connor.*
(5) Supply of answer paper and printed return envelopes.
(6) An interesting card game, to develop your vocabulary.
(7) And finally, an official *"Certificate of Achievement".*

*FOR INDIVIDUAL STUDY*: The complete *"Connor Course,"* as described above, will be sent postpaid *for only* $36. *FOR GROUP STUDY*: Buy one complete *master course* at $36. Each additional member pays *only* $6 *more* for Textbook and complete Study Guide. Delivered with a full money-back guarantee. So, place your order *NOW*:

**Doris Tappan Connor, 114 W. 16 St, New York, N.Y.**